

Esperanto en servo de la monda paco



P A C O

Oficiala organo de Mondpaca Esperantista Movado (MEM)



TODOR JIVKOV
Prezidanto
de la Stata Soveto

6
81

LA VIVINTERESAJ DE LA HOMARO METITAJ SUR KARTON

La decido de la usona registaro de Reagan komenci plenforte la produktadon de neŭtrona bombo ŝokis la homaron. Tiu decido estis sentita de la publika opinio kiel batego sur ĝiajn esperojn pri ĉesigo de la armado, pri antaŭenigo de la afero de l'paco.

La usonaj regantoj komprenis, ke ili kunpuŝiĝos kun ĝenerala malkontentego. Jen kial ili deklaris, ke la produktotaj bomboj estos konservataj en Usono mem kaj komencis persvadi la publikan opinionon, ke la neŭtrona bombo estas „pura“, „humana“.

La aroganteco kaj la cinikismo de la usona propagando estas vere senkomparaj! Sed ĉiuj objektivaj observantoj en la monda gazetaro unuanime asertas: la neŭtrona bombo kondukos nur al pli granda risko de nuklea milito!

La produktado de nuklea bombo prezentas nur unu elementon de la usona strategio pri vetarmado. Vaŝingtono ne kaŝas sian strebon ŝanĝi favore al si la nunan militan ekvilibron per modernigo de la milita maŝino de Usono kaj abrupta kreskigo de ties potenco. Rezulte de tiu piramido de la troviĝanta en la deponejoj de la imperiistaj ŝtatoj armilaro, paralele kreskos ankaŭ la profitoj de la militprodukta industrio kaj neeviteble kreiĝos serioza minaco por la paco.

Aktuale en multaj landoj komenciĝis protestmovado kontraŭ tiu decido de la usona registaro. Akre reagis la ĉefministro de Hindio s-ino Indira Gandhi. Indignaj voĉoj sonas en Azio, Afriko, Latinameriko. En la manoj de la aliancano kaj protektanto de la rasisma reĝimo en Sudaŝrika respubliko kaj de la agresema grupo en Izraelio la neŭtrona bombo ŝariĝas serioza minaco por la popoloj de Afriko kaj Mezoriento. Ja oni bone memoras, ke Usono helpis al SAR kaj Izraelio pri ellaboro de propra nuklea armilo. Nek konsideroj pri humaneco, nek etikaj principoj detenas la usonan imperiismon de novaj krimoj tiurilate, se ĝi opinius „la vivinteresojn de Usono“ „minacitaj“.

Precipe forta estas en Eŭropo la indigno kontraŭ la decido pri amasa produktado de neŭtrona bombo. La okcidenteŭropa publika opinio bone komprenas, ke la neŭtrona armilo, malgraŭ la bruaj refutoj de Vaŝingtono, estos instalita sur eŭropa teritorio. „Tiu bombaj estas destinitaj speciale por instalado en Eŭropo“ — deklaris la gvidanto de Laborpartio de Grand-Britio M. Fut. Sincera alarmo devigis la registarojn de Danlando, Norvegio kaj Finnlando aperigi decidan malaprobon rilate la usonan registaron pro produktado

de neŭtrona bombo. La publika opinio en multaj aliaj okcidenteŭropaj landoj insistas antaŭ siaj registaroj okupi klaran pozicion. En GFR eĉ gvidpersonoj de la reganta en koalicio Libera demokratia partio kaj la proksimaj al ĝi „Junaj demokratoj“ insistis antaŭ la federacia registaro deklari strikte, ke ĝi ne permesos instalon de neŭtrona armilaro sur okcident-germana teritorio. Multaj konataj social-demokratoj parolis en la parlamento kaj ekster ĝi, ke en la ŝtata buĝeto oni-ne devas antaŭvidi monon kio permesus al NATO utiligi neŭtronajn armilojn en Okcidenta Eŭropo.

Renkontinte tiun potencon protestmovadon en Okcidenta Eŭropo, la usonaj politikistoj ŝanĝis alian mensogan manovron: ili vaste ekparolis, ke deziras plibonigi siajn rilatojn kun Sovetunio. Sed okcidenteŭropa gazetaro tuj rimarkis, ke inter la paroloj kaj la agoj de Vaŝingtono ekzistas ega diferenco kaj ke la nova armilo kun pliigita radiado altgrade malfaciligos usonan-sovetan dialogon pri kontrolo super la armado.


Kia estas la reala alternativo?

Sovetunio ne unufoje proponis en Unuiĝintaj Nacioj kontrakton pri reciproka rezigno fare de Usono kaj USSR produkti neŭtronan armilon kaj malpermesi ĝin. Konkreta propono en tiu senco kuŝas sur la tablo de la Komitato pri malararmado en Genevo, sed renkontas obstrukcion flanke de Usono, Grandbritio kaj iuj aliaj NATO-ŝtatoj. Dume, ĝuste propono kaj decido pri internacia konvencio por malaprobo de produktado de neŭtrona armilo plej bone respondas al la strebo fortikigi la pacon en intereso de ĉiuj ŝtatoj kaj popoloj. Des pli, ke la posedo de simila armilo fare de Usono neniigante defendas la usonan popolon kontraŭ atommilito kaj ties sekvoj. Ĉar jam en la unua momento de atako kontraŭ Sovetunio la atommilito prenos detruan tutmondan karakteron kaj nenio savos la usonanojn de katastrofo. Tion bone komprenas iuj politikistoj en Usono kaj ĉiuj progresemaj organizaĵoj en tiu lando. Tial ili protestas indigne kontraŭ la aventurista politiko de l'usona registaro kaj grupiĝas ĉirkaŭ la pacamaj proponoj de Sovetunio pri fortikigo de la paco kaj sekureco de la popoloj.

Ni, esperantistoj, devas bone kompreni, ke hodiaŭ bolas batalo por defendo de la rajto de l'homoj vivi. En tiu batalo ne estas loko por indiferentaj personoj.

La mondaj popoloj estas sufiĉe potencaj por defendi bonrezulte tiun sian fundamentan rajton!

eminenta pacbatalanto



Inter la regnestroj, kiuj lernis kaj propagandis Esperanton, estas ankaŭ la prezidanto de la Stata Soveto de Bulgario Todor Jivkov. kies 70-jaran jubileon festis la tuta bulgara popolo kaj ĉiuj alilandanoj, kiuj estimas lian kontribuon al socialismo kaj por konservo de la mondpaco. Estante gimnaziano en urbo Botevgrad, li lernis la internacian lingvon en kurso, kiun gvidis lektoro Ivan H. Krestanov, membro de la Lingva Komitato, aŭtoro de lernolibroj kaj vortaroj, tradukisto. Kiel atestas liaj samaĝuloj, Todor Jivkov propagandis Esperanton inter la junularo en regiono de Botevgrad.

Post la gimnazio li studis en Sofio, en tipografia lernejo. Tie li amikiĝis kun progresemaj junuloj kaj aliĝis al la laborista antifaŝista movado. En la medio de la Sofia klasbatala proletaro li ekposedis la trajtojn de firma revoluciulo. Dank' al tio dum la antifaŝista batalo li okupis respondecajn postenojn en la eksterleĝa movado kaj partizanmilito. Todor Jivkov estas unu el la gvidantoj de la antifaŝista ribelo en Sofio dum septembro 1944 j.

Baldaŭ post forpaso de Georgi Dimitrov oni elektis lin daŭriganto de la partiaj aferoj. La XII kongreso de Bulgara komunista partio elektis lin ĝenerala sekretario de la centra komitato — posteno, kiun okupis Georgi Dimitrov.

Pli ol 25 jarojn Todor Jivkov tenas en siaj manoj la direktilon de la lando. Lia tasko de stiristo ne estas facila. Necesis giganta fortostreĉo por venki la obstaklojn, korekti erarojn faritajn dum antaŭa periodo, forigi malperfektaĵojn de subjektiva karaktero. Malgraŭ la streĉa mensa laboro, li sekvis la celon senŝancele, inspirata de la devo al sia popolo. Preskaŭ ĉiutage li kontaktis kun laboristoj kaj kamparanoj, junularo kaj intelektularo, klarigis al ĉiuj la antaŭstarantajn taskojn, bruligis la korojn por puŝi la aferon antaŭen.

Surbaze de la akcelita industriigo kaj maŝinigo de la vilaĝmastrumoj, la tuta lando, ĉiu ĝia angulo transformiĝis kaj ekestis nova socialisma vivmaniero. Plialtiĝis la vivstato de la laboruloj kaj ties kulturnivelo. La popolklerigado estiĝis deviga por ĉiuj gejunuloj. Lastatempe la ministerio de popolklerigado enkondukis Esperanton en la mezlernejojn de la lando.

Todor Jivkov estas ne nur praktika aganto, sed ankaŭ teoriulo de granda skalo. Armita per teorio de Marks kaj Lenin, li rimarkas eĉ la apenaŭ percepteblajn ŝanĝojn en la vivo kaj tio donas al li eblecon formuli la taskojn por la nuntempo kaj en perspektivo. Sed tio ne sufiĉas por li. Kun persisto li organizas kaj kontrolas la realigon de la prenitaj decidoj.

La konservo de la paco konstante okupas lin. Dank' al tio li havas la simpatian de la pacamaj popoloj. Li aranĝas regulajn kontaktojn kun gvidantoj de progresemaj partioj kaj movadoj, kiuj celas kontraŭstaron al imperiismo kaj militarismo. Dum la frostaj tagoj de la „malvarma milito“, Todor Jivkov defendis per plena voĉo la tezon de la Komunista Partio de Sovet-Unio, ke nova mondmilito estas evitebla, ke ekzistas premisoj por konservi la pacon. Jam en 1954 j. li deklaris, ke per komunaj klopodoj oni povas firmigi la pacon en Eŭropo kaj plibonigi la rilatojn inter diverssociaj ŝtatoj.

De la tribuno de la XV sesio de la ĝenerala asembleo de Unuiĝintaj Nacioj li proklamis la volon de Bulgario pri paca kunekzistado kaj likvido de la „malvarma milito“. En 1975 j. li gvidis la oficialan bulgaran delegacion al Helsinko, kie partoprenis la Eŭropan konferencon pri sekureco kaj kunlaboro. Li alte taksis tiun konferencon kaj karakterizis ĝin kiel „grandan venkon de ĉiuj, kiuj preferas pacon al milito, kunlaboron al konfliktoj“. Antaŭ la Monda parlamento de la popoloj por paco, kunsidinta en Sofio en 1980 j. Todor Jivkov en verva parolado alvokis ĉiujn pacamajn movadojn diverstendencajn unuiĝi por komune labori por paco kaj sekureco, por mal- ▶

ĝis la lasta okcident-eŭropano

Generalo de Gaulle konsideris, ke partopreno en NATO metas okcident-eŭropajn landojn en situacion de dependeco, tial tiuj landoj riskas esti aŭtomate entremitaj en militon far Usono.

Jam 15 jaroj pasis de post la lanĉo de tiu ideo kaj la historia vizito de De Gaulle en Moskvo, kiu simbolis la komencon de malstreĉiteco en la internacia politik-tensio. Multaj aferoj ŝanĝiĝis en Eŭropo, sed la danĝero devenanta el la trans-oceano ne malaperis.

La Pentagono vidas en la personeco de Okcidenta Eŭropo — saturita per usonaj nukle-armiloj — teatran scenejon de la estonta militbatalado. La mapo de la Malnova Mondo, sur kiu cerbumas la ĉef-stabo de NATO, reprezentas tabulon vere teruregan. La famaj strandaj ripozlokoj en Hispanio apudas al plenŝtopitaj deponejoj de malnova biologia armilo, portanta surskribon: „Fabrikita en Usono“; la vitkampoj ĉirkaŭ la bordoj de rivero Moselle (en GFR) kamuflas la silojn de misilaj fuzeoj; la pitoreskaj marbordoj de Italio estas „protektataj“ de militŝipoj kun usona flago. . .

Tiel, la timo de De Gaulle, ke Okcidenta Eŭropo estus ekstermita aŭtomate en la milito nun fariĝis pli reala. Iumatene la homoj loĝantaj en Eŭropo povus konstati, ke la milito eksplodis ĉe ili. Ekde tiu tago por la ordonistoj de la morto estas programita la detruo de la (homa) civilizo.

La konkludoj de la usonaj strategoj estas terure primaraj: oferi Eŭropon al nuklea milito por savi Amerikon. Lokante la misilojn en okcidenteŭropaj landoj, pli proksime al la ŝtatlimoj de socialismaj landoj kaj pli fore disde Ameriko — Usono volus resti nepunita. Kiel oni ne deziras kompreni, ke la nivelo de la moderna tekniko faras la punon nepreventebla, sendepende en kiu loko de nia planedo oni devas ĝin okazigi?!

Usono ne spertis hajlon de malamikaj bomboj. Tamen Usono faras eraron, kredante ke ĝi ĉiam sukcesos eviti la morton reĵetante eventualan punon al la loĝloko de siaj aliancanoj en Okcidenta Eŭropo. En Vaŝingtono oni tiel rezonadas: „La dua mondmilito forprenis de Eŭropo pli ol 40 milionojn da mortigitoj, kio do? En la nova milito, kiun Usono preparas, ĝi volus militi ĝis la lasta okcidenteŭropano, esperante ke la eŝo de la bombeksplodoj ne atingos Usonon.“

En tiaj cirkonstancoj oni facile komprenas la rapidan sukceson de la kontraŭmilita movado, kiu nun ampleksas Okcidentan Eŭropon. Ĝi estas manifestado de la instinkto pri memkonservado de la popolamasoj. En la sama tempo tiu movado kontraŭ la usonaj nukle-misilaj instalaĵoj elokventas pri la antagonismo inter la spirito de la popolamasoj kaj la politiko de la militemaj rondoj en okcident-eŭropaj landoj, precipe en Granda Britio kaj GFR.

Elstariĝas demando kaj estas malfacile al ni respondi. Okcident-eŭropanoj devas fari tion: de kio estas gvidataj la registaroj, kiuj je la nomo de la usona defendo akceptas la rolon de fulmoforigilo en okazo de nuklea konflikto? Ĉar pri tio precize temas. USSR klare deklaris, ke ĝi ne aplikos nuklean armilon kontraŭ landoj, kiuj ne posedas ĝin sur sia teritorio. Tio donas eblecon al ĉiuj eŭropaj landoj resti for de la nuklea risko per kiu Usono celas ilin ŝarĝi.

Malgraŭ la komplikeco de la internacia situacio, oni devas laŭ ni komenci „malligi la nodon“ per limigo de la proceso pri nuklea armado ĝuste en Eŭropo. „Ni estas pretaj jam morgaŭ sidiĝi ĉe la tablo por intertraktado pri tiu demando“ deklaris Leonid Breĵnev. Tiu invito estas tute konkreta.

Tradukis el franca: Canko Murgin

streĉiĝo kaj senarmiĝo. Lastatempe, kiam la homaron minacas la fabrikata en Usono neŭtrona bombo, li kiel politikisto kun iniciatema karaktero kaj homama koro, proponis fari la Balkanan duoninsulon zono sen nukleaj armiloj kaj tiel savi de pereco la popolojn en tiu malnova mondparto.

Neniu prudenta homo en la mondo povas nei la pacaman principan politikon de PR Bulgario. En tiu pacpolitiko la ĉefa merito apartenas al Todor Jivkov.

En la personeco de Todor Jivkov bulgaraj es-

perantistoj havas malnovan amikon kaj subtenanton. Dum la 63 UK de Esperanto en Varna, 1978 j., la honora protektanto de la kongreso Petr Tanĉev certigis la ĉeestantojn, ke Todor Jivkov estas bona amiko de Esperanto. Li ne ĉesis interesiĝi pri la laboro de la esperantistoj.

Festante la jubileon de la prezidanto de la Ŝtata soveto de PR Bulgario, la redakcio deziras, ke kamarado Todor Jivkov estu sana kaj vigla dum longaj jaroj, por energie kaj saĝe gvidi la bulgaran popolon al pleja bonstato en interpopola paco.

INTERVJUO

DE LA SEKRETARIO DE BRAZILA PACKONSILANTARO

Demando: Ekde kiam vi aktivas en la movado?

Respondo: 30 jarojn mi laboras en la movado por paco en kadre de la Mondpaca Konsilantaro, kies membro mi estas. Por unua fojo mi partoprenas Mondan Esperanto-kongreson kaj ĝoje konstatas, ke Esperanto bone konvenas kaj funkcias en la batalo por pacdefendo.

Demando: Kia estos la historio, kiaj estas la celoj kaj la direktoj de la brazila movado en la proksimaj jaroj?

Respondo: Post 1964-a jaro la puĉo en Brazilo detruis ĉion: la sidejon en Rio kun la telefonaj ligoj, la meblojn, la movadon mem. Multaj pacmovadanoj suferis, eĉ mortis en tiu periodo pro siaj idealoj. Preskaŭ 14 jarojn ni devis labori en plej malfavoraj kondiĉoj, ĉar ekzistas dekreto, kiu malpermesas rilatojn kaj kunlaborojn kun ceteraj internaciaj organizaĵoj.

En nia movado ĉefe aktivas intelektuloj, artistoj, inĝenieroj, ĵurnalistoj en TV kaj la radio, pentristoj, kuracistoj, nukleaj fizikistoj, deputitoj k. a. Multaj el ili helpas la batalon por paco, klarigas al la vastaj popoltavoloj la danĝeron de milito kaj la ligitaj kun ĝi detruaĵoj, homaj viktimoj kaj teruraĵoj. Pro la fakto, ke multajn ja-

rojn en Brazilo ne estis milito kaj pro la geografia malproksimeco de Eŭropo, Azio kaj la cetera mondo, kie furiozas la mondaj militoj kaj eksplodadis A-bomboj, ankaŭ pro la ne tre alta klereco de la ordinara brazilano, la danĝero de nova milito ne estas tiel sentebla inter la vastaj popoltavoloj. Ja tiu fakto formas la plej proksimajn celojn de la Brazila paca movado.

Lastatempe ja pli ofte la televido kaj la gazetaro aperigas materialojn kaj voĉojn kontraŭ la milito. La nova ŝtatprezidento permesas pli da libereco en la ĵurnaloj. Ni esperas, ke la movado oficialiĝos denove post la venontaj balotoj por prezidento.

Nun ni povas konstati kaj deklari, ke la popoloj en Latina Ameriko estas kontraŭ la A-bomboj, armigado kaj industrio, kiu kapablas produkti nukleaĵojn danĝerigantajn la pacon kaj same kontraŭ la similaj programoj.

La Monda Konsilantaro alte aprezas la brazilan movadon kaj pro tio mi reprezentas ne nur la Landan Sektoron, sed same la Mondan Konsilantaron, salutante la 66-an Universalan Kongreson de UEA.

Mi deziras novajn sukcesojn en via nobla laboro.

— Dankon pro via ĝentileco respondi al la demandoj.

Brazilo, 30. VII. 1981

*Interjuis: ing. Petro Todorov
vicprezidanto de BEA*

paco kaj kristanaro

Paco estas unu el la bazaj kaj plej gravaj bonoj por la homo. Ĝi estas valoraĵo, por kies konservo estas necese aktive labori. Hodiaŭ, kiam la paco sur la planedo estas serioze minacata kaj troviĝas en granda danĝero, kiam oni malŝparas freneze kolosajn rimedojn por armado, estas nepre necese ke ĉiuj, al kiuj estas kara la bono de la homaro, kontribuu en maksimuma grado per ĉio, per kio ili povas, por ke ekestu radikala ŝanĝo de tiu terura, premanta stato.

Por realigi la favoran por la tuta homaro ŝanĝon en la internaciaj rilatoj al daŭra universala paco, devas kaj povas kontribui treege ankaŭ la tutmonda kristanaro. La kristanaro devas kontribui por la kaŭzo de la paco ĉion, al kio ĝi estas kapabla. Tiu devo devenas de ĝia humana karaktero, ĝi havas siajn radikojn en sia propra homama esenco. La Instruo de Kristo estas antaŭ ĉio kaj unualoke instruo de kaj por la amo. La du ordonoj pri la amo estas la plej gravaj ordonoj de Dio (Mat. 22:36—40). Se al la kristano mankas amo, laŭ la Evangelio „li estas nenio“ (1 Kor.

13:2). Kaj ĉu eblas, ke ni estu kristanoj, ke ni amu la homojn, deziru la bonon al ĉiuj, sed ne kunhelpu en plej alta grado ne nur por la konservo de la paco, sed ankaŭ por plena kaj ĉiuloka malarmado? Milionoj da homoj ĉie en la mondo suferas pro nesufiĉaj materialaj rimedoj. Estas peko resti indiferentaj kaj apatiaj al iliaj suferoj. Estas peko malŝpari miliardojn por alkonduki la homaron al tutmonda katastrofo kaj pere, kiam ĉi tiuj samaj rimedoj estas tiom necesaj por mildigi la suferon de tiuj, al kiuj mankas elementaj kondiĉoj por homa vivo.

La kristanaro ne nur devas, sed ankaŭ povas, ĝi havas la eblon fari multegon por utilo de la paco kaj kompreniĝo inter homoj kaj popoloj. Ĝi estas kolosa forto. Ĉirkaŭ 30% de la loĝantaro de la Tero hodiaŭ oficiale estas kristanoj. La plimulto de la gvidantaj popoloj en ekonomia, kultura kaj politika rilatoj, la plimulto de la plej potencaj kaj riĉaj ŝtatoj estas kristanaj. La kristaneco penetris ankaŭ en ĉiujn aliajn popolojn, influas sur la vivon de la tuta homaro. Kristanoj

troviĝas ĉie en la mondo, en ĉiuj kontinentoj, en ĉiuj ŝtatoj. La kristanaro disponas kolosan religian literaturon — scienca kaj populara. Ĝi povas respondi al ĉiu vivkoncerna demando, al ĉiu intelekta kaj morala problemo el la starpunkto de sia dogmaro. Kristanaj sciencistoj — teologoj, predikistoj, verkistoj, pensistoj esploris preskaŭ ĉiujn gravajn el teoria kaj praktika vidpunktoj demandojn, kiuj havas signifon por la prospero de la homoj. La kristanaro disponas grandegan nombron da spertaj ekleziaj gvidantoj, diservistoj, homoj de teoria kaj praktika penso, diversflankaj talentuloj. Ĝi havas spertojn akumulitajn dum preskaŭ 2000 jaroj.

Malgraŭ tio tamen ni estas atestantoj nuntempe kaj ankaŭ la historio montras al ni, ke kristanoj, kristanaj popoloj kaj iliaj kristanaj gvidantoj anstataŭ doni ĉiujn necesajn kaj eblajn fortostreĉojn por evitigi militojn, multfoje agis tute alimaniere — nekristane, nepaceme. Kristanaj popoloj kondukis terurajn agresajn kaj kontraŭmilitojn kaj dum ili okazis abomenaj krimoj kaj malhumanaj krimoj.

Ĉu la kristanaj popoloj povas hodiaŭ akcepti alian — pacaman agmanieron? Ĉu la tutmonda kristanaro povas nuntempe doni decidan kontribuon por la paco kaj kompreno inter la popoloj?

Unu el la kaŭzoj, ke la kristanaro ne sukcesis malebligi en la pasinteco militojn kaj la militkonfliktojn estas, laŭ nia opinio, tio, ke la kristanaj eklezioj ne havis klaran koncepton kaj firmam decidemon efiki plej insiste sur la publikan opinion kaj en la spirito de la epoko tiel, ke kreiĝu ĝenerala deziro likvidi ĝustatempe laŭ paca vojo kaj per pacaj rimedoj, en la spirito de la Evangelio, ĉiujn malkonkordojn — kaj eksterlandajn kaj neŭtraligi rapide ĉiujn premisojn kaj kaŭzojn por eventuala estiĝo de militkonfliktoj.

Por ke la kristanaro povu doni decidan kontribuon ne nur al la batalo por evitigi novan mondmiliton, sed ankaŭ al rapida ĝenerala paciĝo kaj malarmado en la tuta mondo, kaj ankaŭ al utiligo de la eblecoj de la nuntempaj scienco, tekniko, kulturo kaj giganta industrio por la bono de ĉiuj homoj sur la Tero, ĝi devas agi unuece, solidare, laŭ la postuloj kaj en la spirito de la Parolo de Dio — la Biblio. Jen kial, por ke la tutmonda kristanaro povu leviĝi al pli alta spirita kaj morala nivelo, kaj ankaŭ por ke la fortostreĉoj de ĉiuj kristanoj kun bona volo povu unuiĝi en la celado atingi aktivan piecon kaj plenan aplikon de la kristanaj intelektaj kaj moralaj normoj por la bono de la nuntempa homaro, ni proponas ke oni kreu „Tutmondan Movadon por Tuteca Kristanismo“, gvidatan de „Tutmonda Centro por Tuteca Kristanismo“. En tiu movado povos partopreni ĉiu kristano kun ĝustaj bibliaj konceptoj pri la bazaj demandoj de la kredo, povos partopreni ĉiu, kiu deziras doni organizitan kontribuon al plena apliko de la postuloj de la Biblio fare de la nuntempa kristanaro, al ĉiurilata bono al la homaro, al konservo kaj firmigo de la paco sur la Tero kaj al helpo al la suferantoj kaj bezonantoj ĉie en la mondo. Aliĝante

al tiu movado, li ne devos eĉ en ioma grado ŝanĝi sian eklezian apartenecon. Tiu Movado ne havos karakteron aŭ statuton de eklezio aŭ de eklezia komunumo. Ĝi ne havos siajn preĝajn domojn, ne okazigos diservojn, ne havos sian eklezian dogmaron ktp. Ĝia celo estos helpi al ĉiuj kristanaj ekleziaj komunumoj efektiviĝi plene kristanismon konforme al la Biblio kaj samtempe konvinki ilin labori intense por stabila kaj daŭra paco sur la Tero. Tiucele ĝi kreas tutecan sistemon por bona sciigo, uzantan ĉiujn rimedojn por amasa informado kaj aliajn necesajn formojn por spirita agado.

Agi kune por efektiviĝo de vera kaj tuteca kristanismo, tio signifas, helpi por la bono al ĉiuj homoj kaj por starigo de stabila kaj daŭra paco sur la Tero.

D. Ĥristov

VJETNAMA SOCIALISMA RESPUBLIKO

270 paĝoj. Eldonis Fremdlingva eldonejo — Hanojo

„Sep milionoj da tunoj da disŝutitaj bomboj, t. e. pli ol 3-oble de la tunkvanto uzita dum la 2a mondmilito sur la mondaj batalejoj, — sen kalkulo de la napalmo kaj la fosforo. Ĉirkaŭ 25 milionoj da bombo-krateroj: en multaj regionoj ne plu restis unusola sendifekta domo, eĉ unusola arbusto.“

Mi ne asertos, ke tio ĉi estas mirinda stilo, sed almenaŭ ĝi estas trafa pentraĵo de la vjetnama situacio post 30 jaroj da milito kontraŭ diversaj imperialismoj. Tiu paragrafo estas eltirita de libreto „Vjetnama Socialisma Respubliko“. Ĉi faras kompletan priskribon de tiu lando, kiu fariĝis tutmonda simbolo de heroismo kaj luktemo.

En tiu libro vi trovos ĉion deziratan koncerne historion, geografion, ekonomion de Vjetnamio. Vi povos informiĝi pri la vjetnama sistemo de edukado, publika sano, scienco kaj tekniko, beletro kaj artoj. Kelkaj paĝoj estas dediĉitaj al la priskribo (ne tre lerta) de la vjetnama lingvo. Se iam vi vizitos tiun landon, manke de gvidlibroj el konataj firmaoj, vi trovos ĉe la fino de la libro 40 paĝojn pri la vjetnamaj vidindaĵoj.

Tamen ne nur laŭdojn meritas la libro, sed ankaŭ kritikojn. Mi ne trovis en ĝi verajn pekojn kontraŭ la Fundamento, sed ofte, oftege, mi trovis pezajn dirmanierojn, pasaĵojn de francaj esprimoj, kiuj montras, ke la vjetnamoj ne sukcesis forpuŝi de la spirito ĉiujn spurojn de la koloniismo. Ekzemple, „konsiderinda laboro“ (p. 150) anstataŭ „grandega laboro“ (verŝajne la aŭtoro havis en la menso la francan esprimon „travail considérable“) same, „primara lernejo“ (p. 129) anstataŭ „unuagrada lernejo“. Pli gravaj estas „permesas“ (145) kaj „estis permesontaj“ (p. 248), eraraj francismoj por „ebligas“ kaj „ebligis“ (la formo „estis-onta“ estas perfekte senutila en 95 procentoj de la kazoj). Por varii, jen tre peza germanismo: „La organizitaj de post 1977 en la Sudo seminariaj festivaloj“ (p. 203). Anstataŭ „Kmer“ (p. 59), franca prononco, kial ne uzi „Hmer“, PIV-a formo konforma al la kampuĉa prononco? Kial „Ĉiang Kajŝek“ (p. 184)? Respekte al la unusilabeco de la ĉinaj vortoj, la ĝusta formo estus „Ĉang“ (cetere „Esperanto en Perspektivo“ faris la saman eraron). Kion signifas „kompradoro“ (p. 41) kaj „arhato“ (p. 192), ne-PIV-aj vortoj, kiuj necesigus glosojn? Kaj mi trovis tre stranga la ortografion „Vjet Minh“, en kiu „Vjet“ estas esperanta, dum „Minh“ estas vjetnama (pli ĝustaj estus „Viet Minh“ aŭ „Vjetmino“).

André Cherpillod



USSR

Ni, anoj de Esperanto-klubo „AMIKECO“ en Ternopol, dum kunsido ligita kun 40-a datreveno de la perfida atako de Faŝisma Germanio kontraŭ Sovetunio, aŭskultinte prelegon pri la milito kaj informojn pri la nuntempa internacia situacio akceptis deklaron, en kiu interalie estas dirite:

„Ni malaprobas kaj kondamnas la strebon de iuj tavoloj en diversaj kapitalismaj ŝtatoj, unuavice en Usono, venenigi la etoson en la mondo per disvastigo de malveraj elpensajoj pri minaco al la paco flanke de Sovetunio.

Ŝovetunio pli forte ol ĉiuj aliaj ŝtatoj suferis pro la milito. Tial ĉiuj sovetiaj homoj pli bone ol aliaj komprenas, kia malfeliĉo por la tuta homaro estus nova milito. Ili ne volas ke la pereado de 20 000 000 da sovetianoj, mortigitaj dum la lasta milito, restu vana. Nia registaro, realigante la deziron de la tuta sovetia popolo, gvidas pacan politikon. Nur paco povas krei kondiĉojn, en kiuj plialtigados la nivelo de bonstato de la tuta popolo t. e. efektiviĝos la ĉefa celo de socialisma ŝtato. Tial Sovetunio faras ĉion eblan por defendi kaj firmigi la pacon, por preventi novan militon. En la mondo ne ekzistas nun pli grava tasko ol defendi la pacon, ol liberigi la homaron de militminaco.

La reciproka certeco pri sekureco inter la kapitalisma kaj la socialisma landaroj devas ekesti ne sur bazo de vetarmado, kiel deziras iuj en Usono, sed sur la bazo de iom-post-ioma reduktado de armado, ĝis plena malarmigo, dank' al kreo de etoso de reciproka fido.

Ni, Ternopolaj esperantistoj, uzas niajn esperantlingvajn internaciajn ligojn por krei inter diversaj popoloj etoson de amikeco kaj frateco, kiu obstaklos al la fipropagando de la vetarmado. Ni uzos Esperanton kiel valoran ilon por pacbatalo.

Ni alvokas ĉiujn Esperanto-klubojn kaj societojn koncentrigi siajn fortojn por realigi analogajn pacamajn celojn.

ĈSSR.

Esperanto-rondeto ĉe KD ROH DUKLA Pardubice ricevis okaze de la III-a pacrenkontigo honortitolon „Esperanto-rondeto de pacdefendantoj“, de Distrikta packonsilantaro en Pardubice pro sia porpaca laboro en lastaj jaroj.

Membroj de la nomita rondeto ĉi-jare, kiel en aliaj jaroj, partoprenis la 21-an de junio pacmarŝon al Ležáky. Iuj marŝis 50 kilometrojn, aliaj elektis laŭ sia fizika ebleco pli mallongan distan-

con. La plejmulto da esperantistoj partoprenis marŝon „M“, tio estis 12 kilometroj, kiu komenciĝis kaj finiĝis ĉi-jare en Vrbatuv Kostelec. Poste ĉiuj esperantistoj komune vizitis muzeon en Ležáky, enskribis sin en la memorilbron kaj rememoris 39an datrevenon de nazi-fiago, la elbruligo de vilaĝo Ležáky kaj murdo de vilaĝanoj en Zámeček, Pardubice.

La pacmarŝo al Ležáky estas aranĝita sub aŭspicio de multaj organizaĵoj; dum lastaj 3 jaroj ankaŭ sub aŭspicio de Ĉeĥa Esperanto-Asocio. Ĉijare kiel delegito de ĈEA partoprenis samideano Dr. Kočvara el Ostrava, kiu oficiale prezentis sin al la estraro de la organizantoj de pacmarŝo en Ležáky.

Per sia partopreno en la pacmarŝo la esperantistoj dokumentis sian volon batali per ĉiuj fortoj por savi la pacon.

REZOLUCIO

Ni, partoprenantoj de la IV-a Internacia Turisma Renkontigo de Ercmontaraj Esperantistoj en Merklín-1981 esprimas nian varman sopiron por la mondpaco. Ni estas malkontentigitaj pro la nuntempa situacio en la mondo akriĝinta kulpe de imperiistoj. Konsentante kun la rezolucio de socialismaj landaj Esperanto-organizaĵoj akceptita en Prerov, ni kondamnas la decidon de la NATO-konsilantaro pri lokigo de novaj atomraketoj en okcidenta Eŭropo.

Ni senrezerve subtenas ĉiujn sociajn fortojn, organizaĵojn kaj movadojn, kiuj energie kontraŭstaras la fabrikadon de nukleaj kaj neŭtronaj armiloj iniciatita de la usona administrataro.

Antaŭ kvardek du jaroj la tenebraj fortoj en faŝisma Germanio startis la plej teruran militon en la mondhistorio. Ni propraokule konatiĝis kun la lokoj, kie niaj patroj energie protestis kontraŭ la faŝisma danĝero — same ni hodiaŭ proklamas nian kuraĝon ne plu permesi al la milituloj denove puŝi la mondon en inferon de plej terura milito. Ni ĵuras antaŭ la tuta mondo, ke ni ne ĉesigos nian porpacan batalon ĝis ĉiu militdanĝero malaperos el nia bela planedo.

Partoprenantoj de la IV-a Internacia
Turisma Renkontigo de Ercmontaraj
Esperantistoj el ĈSSR, Hungario,
GDR kaj Pollando

Aŭstrio

De la 9-a ĝis la 15-a de junio okazis komuna pacsemajno de la pacorganizaĵoj en Salzburgo. En kadro de tiu pacsemajno ni okazigis komunan „informfoiron“ kie ĉiu grupo havis okazon ekspozicii siajn informojn. Mi ekspoziciis informojn pri la E-movado, antaŭ ĉio pri MEM. Mi ankaŭ disvastigis flugfoliojn en germana lingvo pri MEM. Por tio mi uzis la tradukitan tekston de „Mesaĝo“ al la partoprenantoj al Aŭstria Studenta Pacsemajno de la prezidanto de MEM Imre Pethes kun suplementa propra teksto.

Mi ekspoziciis Esperantan kaj germanlingvan materialon. Por salzburgaj kondiĉoj mia informstando estis sukceso.

La pasantoj montris, ke ili interesiĝis pri la esperantlingvaj revuoj (Paco, Pacaktivulo kaj aliaj revuoj). Mi ankaŭ kolektis subskribojn por malarmado.

Je la vespero de tiu tago estis manifestacio por paco kaj ni eĉ simulis atombombatakon en kadro de tiu ĉi manifestacio.

Generale la politika atmosfero en Aŭstrio evoluas progreseme kaj tio parte estas ankaŭ la „merito“ de la militinstigantoj, ĉar ili rekte transprenis agitadenhavojn de Usono al aŭstraj reaciaj revuoj, sen atento pri la diferenco inter la konscio de la usona kaj la aŭstria popoloj kaj tio ĉi kelkfoje efikis kiel oni subite renkontus dinaŭron.

Edith Jax

Brazilo.

La Komitato de UEA en sia kunsido dum la 66-a Universala Kongreso elektis la konatan pacbatalanton — MEM-anon S. N. Podkaminer, vicprezidanton de la Asocio de la Sovetiaj Esperantistoj honora membro de UEA.

Sincerajn gratulojn pro la alta honorigo, kara pacamiko Podkaminer!

P. T.

Bulgario.

La 27-an de aŭgusto en la ĉemara urbo Varna okazis tuturba esperantista kunveno, organizita de la Distrikta Estraro de BEA. Ĝi estis dediĉita al la batalo por paco kaj malarmado. Malgraŭ la feria sezono la klubejo sur strato „San-Stefano“ montriĝis malvasta akcepti ĉiujn partoprenantojn. Prelegis la elstara bulgara esperantisto — pacbatalanto Nikola Aleksiev, membro de la Monda

Packonsilio, honora prezidanto de MEM kaj honora membro de UEA.

En sia prelego N. Aleksiev faris profundan analizon de la internacia situacio kaj la batalo por paco, emfazante la aktivecon de MEM.

„La plej grava tasko de ĉiuj pacamaj homoj, inkluzive de la esperantistaro, estas batali energie kontraŭ la insidaj streboj de la imperiistoj al nuklea milito. Ni devas batali uzante ĉiujn eblajn formojn kune kun neesperantistaj pacmovadoj kaj organizaĵoj sendepende de politikaj, religiaj, filozofiaj kaj aliaj konceptoj, per ĉesigo de ĉiuj militoperacioj sur la terglobo, de interveno en la internajn aferojn de liberaj popoloj, kontraŭ la koloniismo, por estigo de vera, demokratia, de neniu minacata tutmonda paco“ — emfasis la preleginto.

Nun kiam la usonaj imperiistoj urĝas la vetarmadon kaj provokas la pacamajn popolojn, la esperantistoj sentas sian respondecon por konservo de la paco. Per tio oni povas klarigi la grandan intereson de la partoprenantoj al la interesa prelego entuziasme aplaŭdata (al tio kompreneble influis ankaŭ la personeco de la preleganto).

La kunveno akceptis telegramon al MPK, en kiu ĝi kondamnas la klopodojn de la imperiistoj nuligi la komenciĝintan malstreĉecon en la internaciaj rilatoj kaj apelacias al ĉiuj homoj de la bona volo, ĉie kaj ĉiumaniere, kun plena konscio kaj fervoro batali por firmigo de la tutmonda paco, por certigi gajajn ludojn por la infano, pacan kreon vivon por la tuta homaro.

Post la kunveno la ĉeestantoj metis siajn subskribojn sub apelacion de Kvakera Esperantista Societo por malarmado en la tuta mondo.

Saša Nedeva

ekumena voĉo de paco

Ĉeĥoslovakio. En mondfama banloko Karlovy Vary kunsidis en la tagoj de 22. 06. — 24. 06. 1981 prezidio de la Berlina konferenco de eŭropaj katolikoj el 13 landoj. Konklude estis eldonita jena proklamo (esenco):

„Ni instigas ĉiujn homojn de bona volo en tuta Eŭropo, efike subteni ĉiuspecan agadon por malarmado, sekureco kaj paco. Nuntempe jam ne plu temas pri ekzisto de tiu aŭ alia sociala ordo aŭ mondkoncepto, sed pri milito aŭ paco, pri morto aŭ vivo. Ĉar homo ne rajtas neniigi tion, kion kreis Dio, ni devas fervore strebi pri interkompreniĝo kaj fido inter ŝtatoj, pri forigo de danĝero de pereco kaj morto.

Tial ni alvokas ĉiujn subteni realigon precipe de jenaj proponoj:

— kunvoko de tuteŭropa konferenco pri milita malstreĉiĝo kaj malarmado;

— kunvenigo de eksterordinara kunsido de la Konsilantaro por sekureco de UN cele sanigi la streĉitan internacian situacion kaj malebligi militon;

— renkontiĝo de plej altaj reprezentantoj de Usono kaj Sovetunio por limigi la armadon kaj interkonsenti pri ĝia kontrolo.“

FR Germanio. Okcidentgermana federacio de katolikaj studentoj eldonis proklamon kontraŭ decido de NATO dislokigi novajn amasmortigilojn en Eŭropo.

Usono. La nordamerika episkopo William Weigand alvokis la registaron de Usono nome de katolikoj de lia diocezo ĉesigi eksperimentojn per la interkontinentaj raketoj MX. En tiu ĉi proklamo publikigita en katolikaj gazetoj de Saint Lake City li karakterizis la nukleajn planojn de Pentagono kiel nemoralajn. Kontraŭ fabrikado de rake

Günter Kunert

LA BILDO PRI LA BATALO ĈE ISONZO

Ankaŭ la pentristo partoprenis la batalon; baldaŭ poste li faris bildon, sur kiu li prezentis, kion li vidis: en la antaŭo kuŝis mortantoj, kies intestoj eliĝis el la disŝiritaj korpoj, kaj kadavroj, tra kiuj moviĝis ĉevaloj kaj tankoj, tiel ke nur restis sanga kaĉo ornamita per ostosplitoj. Malantaŭ tio la soldatoj de la kontraŭaj armeoj sturmis unuj kontraŭ aliaj, en kotigintaj uniformoj, kun vizaĝoj torditaj pro timo. En la fono, sube de komandejo, oficiroj kuniĝis kun virinaĉoj, aliaj drinkis konjakon, formarĉandinte ekipaĵon de tutaj kompanioj kontraŭ bona mono.

Jen la bildo, kaj ĝi pendis en ateliero de la pentristo, kiam aperis vizitanto, kiu volis portretigi sin kaj per la sinteno elmontris sin iama generalo. Li ektimis antaŭ la bildo.


— Tiel la batalo neniam estis, li kriis, la bidlo mensogas!

Lia palpebrumanta rigardo trakuris la verkon ĉiudirekte kaj tiel malantaŭ la frakasita kranio de mortinto malkovris malgrandan figuron, kiu tamburante kaj kantante kaj kun aŭdace lokita kasko kuris al la batalejo. Tiun ĉi detalon la generalo aĉetis, igis ĝin tranĉi el la pentraĵo kaj enkadrigi: por ke venontaj generacioj povu havigi al si bildon pri la granda batalo ĉe Isonzo.

Tradukis: D-ro Karl Schulze



Usona kontribuo al la malarmado



Onklo Sam: — Ne maltrankviliĝu, en la momento ĝi restas ankoraŭ ĉe mi.

toj MX esprimiĝis ankaŭ la protestanta episkopo Otis Charles.

Ĉeĥoslovakio. En ĉefurbo Praha okazis je la 1—3. 07. 1981 traktado de internacia virina komisiono de la Kristana packonferenco pri respondeco kaj tasko de virinoj en strebado por paco kaj sociala justeco. Reprezentantinoj de eklezioj el 22 landoj de la tuta mondo esprimis kategorian proteston kontraŭ pligrandigado de armado kaj dislokigado de novaj nukleaj armiloj en Eŭropo. Ili esprimis ankaŭ sian solidarecon kun la samtempe okazanta porpaca marŝo de virinoj el Kopenhago al Parizo. Vobĉo el tiu ĉi konferenco konfirmis, ke kristanaj eklezioj fariĝas ĉiam pli kaj pli aktiva parto de tutmonda porpaca fronto.

Dekmembra delegacio de katolikaj kaj evangeliaj kristanoj el Nikaragva vizitis laŭ invito de Kristana Packonferenco en la tagoj de 24. 06.—30. 06. 1981 Ĉeĥoslovakion. Ili intertraktis kun reprezentantoj de la Ekumena konsilantaro de eklezioj kaj pluraj ekleziaj organizaĵoj en ĈSSR, informinte pri unueco de kristanoj en Nikaragva, kiuj — inspire de evangelio de Jesuo Kristo kaj akorde kun la enlanda revolucia procedo — aktive

kontribuas krei novan, justan vivon en tiu ĉi lando. Poste ili vizitis ankaŭ Sovetunion, Hungarion kaj Bulgarion.

Japanio. Patrino Terezo el Kalkuta, laŭreato de pacpremio de Nobel, partoprenis konferencon de UNO en Tokio, kie ŝi esprimis deziron, ke ĉiuj landoj en la mondo disponigu la enormajn rimedojn, ĝis nun senutile elspezatajn por armado, favore al malriĉuloj, kiuj en multaj partoj de l'mondo ĉiutage mortas pro malsato kaj malsanoj, kaŭzataj pro mizero.

J. K.



TRIPTIKO

Hristo Kozlev

VENTO, HO VENTO. . .

Vento, ho vento, vi flugas vage,
ĉu do vagante nokte kaj tage
tra vilaĝetoj kaj kabanaroj,
kamparoj vastaj, verdaj arbaroj —
ĉu vi renkontas, ho kara vento,
mian amaton kun la taĉmento?

Se vi lin vidus, vi lin demandu
ĉu li plu restas vigla luktanto,
aŭ lin jam tedis senhejme vagi,
la malamikojn ĉiam ataki?
Ĉu pri l' edzino sonĝe sopiras,
ĉu al infano amo lin tiras?

Vi lin salutu kaj komuniku
mian deziron, vento-amiko:
ke li subpremu sian angoron,
ke en disiĝo konsolu koron,
ke li vagadu en ĉiu loko —
nur lia hejmo lin ne allogu!

Ĉar ĉe la vojoj, vojetoj, placoj,
oni embuskas nokte lin ĉie,
venas konstante kaj kun minacoj
pri li demandas, insultas fie —
vento, ho vento, vi kara frato,
tion sciigu al la amato!

NOKTO

Nokta hor' senvoĉa kaj senbrua,
senvekiĝa nokto de julio,
kvazaŭ tombe dormas tuta mondo,
en nebulo densa dronas ĉio.

Ne aŭdiĝas kanto, voĉo birda,
branĉoj vibras, susurante treme.
Nur mi viglas, kaj la etaj steloj
briletantaj sur ĉiel' timeme.

La vilaĝo kuŝas en silento. . .
Kaŭras la malalta dom' argila.
Ĉe la heĝo staras nigra arbo,
ie lumas lampireto brila.

Kvankam nekonata, malproksima,
tie ĉi mi estos kara gasto.
Min akceptos kun sincera koro
la domanoj kaj la bona mastro.

Mi transsaltas dornohavan heĝon
kaj singarde iras al la domo.
Per panpec' la hundon mi aĉetas,
kvazaŭ estus aĉetebla homo.

Facilpaŝe mem ĉe la verando
mi momente haltas spirretene.
Mi rigardas fikse en la nokto —
ĉiuj kuŝas lace, dormosvene.

Mi facile frapas per la mano. . .
Iu timvekiĝas salte.
— Kiu? — dormebria voĉ' demandas.
— Mi. Amiko — flustras mi mallaŭte.

Nokta hor' silenta kaj senbrua —
senvekiĝa nokta hor' julia.
Dormas tombe nun la tuta mondo,
nur ni viglas en dometo nia.

KONTRASTOJ

Ekstere kantas la printemp' per verda foliaro,
en nia ĉel'-libersopir', angoro kaj amaro.

Ekstere sternas sin tapiŝ' el herbo, floroj ĉarmaj —
ĉe ni cement', karceroj nur kaj muroj ŝtonmalvarmaj.

Ekstere sunradioj, lumo, vasto kaj lazuro —
en la karceroj nur cemento, frosto kaj obskuro.

Ekstere sonas kantoj nun alaŭdaj, najtingalaj —
en la malliberejo tinto de katenoj ŝtalaj.

Ekstere ŝaŭmas kun impeto akvoj de torento —
malrapidege en la ĉel' fluadas nia tempo.

Ho, kiam venos vi al ni, printempo ridetanta?
Ho, kiam venos do al ni, vi libereco sankta?

Tradukis:
As. Grigorov

LIEBOLD

Fritz Rudolf Fries

Antaŭ nelonge mia patrino rigardis de super la gazeto, kiun ŝi legis antaŭtagmeze, kaj diris: „Liebold mortis. Ĉu ni partoprenu la entombigon?“ Mi forgesis tiun demandon, pensante pri la malnova kvartalo, el kiu ni transloĝiĝis en alian pli bonan antaŭ jaroj. Tie ĉio estis griza, antaŭurbaj fasadoj kun malgranda elrigardo al herbejoj kaj ĝardenetoj. Sur la herbejoj okazis amatoraj boksadoj; du viroj, kiuj enigis gumringojn en siajn buŝojn, antaŭ ol la trejnistoj fermligis al ili la gantojn. Tra la kolonio de etĝardenoj ni procesiis kun lanternoj, kiuj disvastigis flore molan lumon en julinokto. Je la festotagoj la eminentuloj de la kvartalo, posedantoj de malgrandaj vendejoj, kiuj ĉiuj balotis por la nazia partio por fariĝi posedantoj de grandaj vendejoj, butikistoj, dikventraj buĉistoj, sekvis la timbalojn, tintilojn kaj fanfaron, kaj la homoj rigardis el la fenestroj. Liebold ne estis inter ili; tiu estis okupita ankaŭ dum festotagoj, aŭ tiu speco de muziko estis eble tro laŭta por li. Ofte li vizitis nin kun siaj gasbekoj, lutiloj, ŝmirskatoloj, tenajloj kaj plumbaj tuboj, novaj kranjoj. Ne

Fritz Rudolf Fries naskiĝis 1935 en Bilbao (Hispanio) kiel filo de komercisto. En Leipzig li studis romanistikon kaj laboris ekde 1958 kiel tradukisto kaj interpretisto kaj ekde 1966 kiel verkisto. Li iĝis konata, precipe per „La televida milito“, per siaj kolektoj de historiaj skizoj, vojaĝimpresoj kaj rakontoj, per kiuj la aŭtoro, krom informado, celas komprenebligi homajn kondutojn kaj ŝanĝiĝojn. Specialajn meritojn li akiris per la traduko de multaj verkoj hispanlingvaj.

estis eĉ unu domo en nia strato, en kiu Liebold ne estis. La homoj nomis lin koboldo, ĉar kiel tia li aspektis: nerazita, kun la ĉapo profunde tiritita al la musokuloj, la kolo ĉiam iomete etendita antaŭen, aŭskultanta, vigla en naturgriza kolumo, haste vokita de trans la strato ĉe tubrompiĝo kaj difektaj instalaĵoj fluakvaj. Senkonsidere al suno aŭ pluvo la okuloj gvasis sub la profunda ĉapo al la malfeliĉo. Sian ilaron li kunportis en ligna kesto, alveninte li etendis ĉion sur ĉifono, en la kuirejo, la banejo. La loĝejuantoj staris ĉe la pordo, Liebold lasis ilin stari, neniam li parolis pli multe ol tion, kio necesis por orientiĝo pri la difekto. Li kutimis labori sola, helpiston li neniam prenis al si, la edzino pereis en bombatako al alia urbo (ŝi tie vizitis sian kuzinon). Liebold mallernis paroli, oni diris. Pri liaj monologoj oni ne povis scii ion. Krome la tempoj estis tiaj ke parolado alportis eĉ ne arĝenton, escepte, se oni scipovis intence paroli. En la Tria Regno li aspektis kvazaŭ la karbŝtelisto sur la murafiŝoj. Foje li malaperis por unu monato. Laŭdire oni trovis presmaŝinon en la kelo de lia teretaĝa loĝejo, per kiu sendube estis presitaj tiuj flugfolioj kiujn oni trovis en filiko ĉe promenado tra la arbaro. La Gestapo ne povis pruvi ion al li. Li revenis en sian metiejon, kaj kion li povis diri, nun povus diri, li frapis sur la postajon de potoj kaj kaseroloj. Dum la kvar semajnoj amasiĝis ĝismonte la varoj, kiujn la homoj demonstracie alportis al li, por tiel kontribui al la pruvo de lia senkulpeco. Sed ĝuste tiu pruvita senkulpeco ŝajne pripensigis Liebold. Potoj kaj patoj kuŝis staplitaj en angulo de la korto, havante paperetojn kun nomo kaj domnumero sub la kovrilo aŭ ĉe la tenilo.

Kiam post sia eksigo Liebold estis vokita en loĝejon, ĉar la krano estis tralasa, la klozeto ŝtopita, oni povis kelkfoje aŭdi lin murmuri „krimuloj“, liaj makzeloj muelis ion, kio perdiĝis en la muĝado de la riparita fluakva instalaĵo.

Sajnis, ke dum la kvar semajnoj iu ŝanĝiĝo okazis pri li. Oni povus ekbabili kun li, se oni nur vere volus tion. Li fariĝis nefidinda, la homoj atribuis tion al la morto de lia edzino, al la kvar semajnoj, la aĝo, la milito entute.

Post la liberigo oni povis interpreti kelkon, kio iam estis enigmo pri Liebold. Post sia reveno el la Gestapo-malliberejo li uzis presmaŝinon, sian propran aŭ iun alian, kaj kunlaboris kun rezistgrupo el labordevigitoj, kiuj estis lokitaj en barako en la banejo de la etĝardena kolonio. Per sia presmaŝino li presis, kion liveris al li la sendstacioj, por kiuj oni riskis la kapon. Kiam en la vintro de la lasta militjaro oni balaante levis la ŝu-purigajn matojn, oni trovis informojn presitajn en neregule dancanta skribo pri la kolapso de la fronto, pri la lastaj militkrimoj, pri la veno de nova tempo. Neniu iel cerbumis pri tio, ke tiuj informoj troviĝis sub la laŭgazete presita linio: LA LUTILO. Liebold presis tion laŭ manskribitaj paperetoj, kiujn perantoj ŝovis nokte tra la fenestro de lia kelo. Dumtage li kiel ĉiam lutis la potojn por la militsupoj.

Post la liberigo oni volis fari Liebold urba deputito. Ĝuste tion li ne volis kiel li klarigis al la partio per kelkaj frazoj, la plej longaj de lia vivo. Ĝuste nun, li diris, pli multe ol iam ajn necesas veldi tubojn, ripari militdomaĝojn. Kion do, li opiniis, li povas atingi sidante sur seĝo, ĉe skribotablo. Oni faris lin aktivulo jam ekde la unua horo. La najbaroj alportis al li bukedojn da diantoj, por kiuj nur ununura polvokovrita vazo troviĝis en la bufedo.

Antaŭ nelonge li mortis. Jam delonge li iris por akcepti sian pension je la komenco de la monato, cetere li nur malofte eliris el la loĝejo, krom por partopreni kunvenojn de la partio, krom por fojfoje viziti kinejon, kio dum la lastaj jaroj fariĝis lia pasio. Malofte li ankoraŭ lasis sin logi en loĝejon, por aparte komplika operacio, pro ŝatokupo, malbabilema kiel ĉiam, neŝanĝiginta, iomete pli klinita, pli gnomeca, formortanta ekzemplero.

Liebold estus mortinta soleca, se ne la historia kontinueco de lia lando estus instruprograme de la proksima lernejo. Sed tial oni interesiĝis pri li, ĝustatempe eksciis pri lia naskiĝtago, havis en tio bonŝancon, ĉar estis la sepdeka, kaj ĝi okazis la lastan tagon antaŭ la grandaj ferioj. Frue junpionira delegitaro sonorigante venigis lin al la pordo kaj transdonis al li florojn, kaj je la posttagmezo ili prenis lin en sian mezon kaj alparolis lin per poemo, kiu priskribis la farojn de liaj viraj jaroj per disdividitaj roloj. Ili kondukis lin procesie al la pretigita tablo en la junpionira ĉambro. Liebold la glorata, Liebold kiel modelo, Liebold kiel temo de estontaj stilekzercaĵoj. Liebold kiel oratoro antaŭ knaboj kaj knabinoj, Liebold, kiu frotas sian malbone razitan mentonon kaj poste rakontas serioze la finon de gaja historio.

En la grandaj ferioj li mortis. Poŝtkartoj kaj desegnoj de foraj vojoj, verdaj arbaroj kuŝis sur lia noktotablo.

Tradukis D-ro Karl Schulze
Berlin
El „La televida milito“



RR. Al ambaŭ mi sugestis ne agresi...

ĈU SLAVLINGVA ALFABETO ESTIS LA INSPIRO POR LA SUPERSIGNOJ?

En *Plena Gramatiko (PG, 3-a eldono, 1958, § 3, p. 24)* troviĝas aserto, ke la sistemo de sonprezentado en Esperanto estis inspirita de la ĉeĥa alfabeto. Temas pri la skribo de gingivaj sonoj ĉ, ĝ, ĵ, ŝ, ne per kunigo de du aŭ tri simplaj literoj (digramo, trigramo) kiel en kelkaj etnolingvoj, sed per modifo de la formo de la konsonantoj, el kiuj tiuj sonoj devenas. Tiu ŝanĝo okazas per la meto de cirkumflekso aŭ „ĉapelo“ super la literon. En la sama sekcio de PG estas klarigo, ke en la ĉeĥa alfabeto la cirkumflekso estas returnita. Oni kutime nomas ĝin pinthoko, kiu estas traduko de ĝia ĉeĥa nomo háček, „hoko“. La cirkumflekso estas uzata en Esperanto por marki, krom la gingivaloj, ankaŭ la frikativan velaron ĥ por distingi ĝin disde la laringala h.

G. Waringhien (*Lingvo kaj Vivo, 1959, p. 21, piednoto 1*) spekulativas pri la kialo de la ŝanĝo de la formo de la konsonanta supersigno de Pra-Esperanto 2, kiu estis suprenstreko identa kun tiu super la polaj literoj ć, ń, ś kaj ź. En la pola alfabeto tiu supersigno palataligas la konsonanton. Waringhien rezonadas, ke Zamenhof volis eviti similecon inter sia lingvo kaj iu etnolingvo, do li anstataŭigis la suprenstrekon per la ĉeĥa pinthoko, kaj por ke Esperanto ne havu tro ĉeĥan aspekton, li renversis ĝin kaj ricevis la cirkumflekson. Rimarku, ke kvankam ankaŭ la franca alfabeto havas la cirkumflek-san supersignon, ĝi estas uzata tie nur kun vokaloj por modifi ties prononcon.

Alia opinio pri la praformo de la supersignoj de Esperanto estas esprimita en verko de slovaka aŭtoro. En sia artikolo titolita „Slavaj elementoj en la nedefinitiva Esperanto“ (*Esperantisto Slovaka, 1951, n-ro 1, p. 3–5*), J. St. Navala citas la poemon „Ballado“ de H. Heine, tradukitan de Zamenhof en tiun fruan dialekton, kiun esperantologoj kutime nomas Pra-Esperanto 2. La aŭtoro ĉerpis tiun tekston el antaŭe publikigita artikolo de G. Waringhien (*Lingvo Libro, 1938, n-ro 1*), Tri supersignoj estis uzataj: suprenstreko super la vokalo é, malsuprenstreko super à, kaj pinthoko super ŝ kaj ž. Pro tio, la aŭtoro konkludas jene pri la supersignoj de Pra-Esperanto 2: „Ili estas tute identaj kun la niaj [slovakaj].“

S-ro Navala malpravus, sed li ne kulpis pri tio. Li sencie bazis siajn konkludojn sur nefidinda sekundara fontmaterialo. La teksto en *Lingvo Libro*, kiun li kopiis, ne ĝuste montris

la formon de la supersignoj en tiu frua stadio de Esperanto. Tio okazis, ĉar la eldonisto Vilmos Bleier, ne volante akiri novajn litertipojn, tut-simple kompostigis la tekston per litertipoj de la ĉeĥa alfabeto. Pro tio du konsonantoj aperis kiel ŝ kaj ž. La originala teksto de „Ballado“ estas ekzakte reproduktita en *Lingvo kaj Vivo p. 27* kaj en la kvina volumo de *Iam Kompleta Plena Verkaro de L. L. Zamenhof, Eldonejo Ludovikito, Kioto, 1976, p. 114–115*. Tiu-cele ambaŭ eldonistoj devis muldigi specialajn litertipojn. En la originala teksto ne troviĝas malsuprenstreko sur è; ĝi estas presita é same kiel la supersignita á. Cetere, la du supersignitaj konsonantoj ne havas pinthokon; super ili estas suprenstreko: ś, ź.

En alia verko, *Leteroj de Zamenhof*, redaktita de G. Waringhien (1948, vol. 1, p. 353) estas represita fragmento de artikolo de d-ro Zamenhof, neniam publikigita, sed ekzistanta nur kiel kopio farita de Camille Aymonier. Ankaŭ ĝi aperis en la citita numero de *Lingvo Libro*. En *Leteroj de Zamenhof* la redaktoro klarigas en piednoto (p. 352) ke en la originalo la supersigno estis suprenstreko sed, manke de tiaj litertipoj li devis montri ilin per apostrofo metita post la konsonanto: c', g', h', j', s'. Krome la è havas malsuprenstrekon.

Nun estas evidente, kiel malzorga traktado de unu el la fruaj tekstdokumentoj en Esperanto erarigis s-ron Navala, kun la rezulto, ke li mise konkludis, ke Pra-Esperanto 2 havis la samajn supersignojn kiel la alfabeto de lia gepatra lingvo, la slovaka.

Ankoraŭ unu frazo en la artikolo en *Esperantisto Slovaka* estas ĝustigenda: „La supersignitaj konsonantoj havis dum longa tempo la formon „č“ (ĉ), „ž“ (ĵ), „ď“ (ĝ), „š“ (ŝ). En la originala versio de la nepublikigita artikolo, Zamenhof uzis ne č, ž, ď kaj š sed ć, ź, dź kaj ś. Fine, pro nescio, s-ro Navala diras ankaŭ tion ĉi:

„Mankas mencio en *Lingvo Libro* pri literoj ĥ kaj ŭ, kiuj en Pra-Esperanto 1 kaj 2 versimile ne ekzistis.“ Tamen en la du ĉi-supre menciitaj verkoj kun ekzaktaj tekstoj estas troveblaj en Pra-Esperanto 2 jenaj vortoj: arĥa, (arĥaja, arkaika, antikva); kaŭ (apenaŭ); reĝidaŭ (regidino). La duoncirkla supersigno super la „ŭ“ plej verŝajne venas de la rusa alfabeto, kie ĝi estas uzata super la litero Ъ (j). Rimarku la paralelaĵon inter la rusa literparo И (i) — Ъ (j) kaj la Esperanta paro „u“ — „ŭ“.

Ĝis nun neniu esperantologo prezentis konvinkan pruvon, ke Zamenhof konis la ĉeĥan aŭ la slovakon lingvon, do estas riske aserti, ke la alfabetoj de tiuj lingvoj influis la ortografian sistemon de Esperanto. La praesperantaj konsonantoj kun suprenstreko sendube imitas la supersignitajn konsonantojn de la pola lingvo, kiun Zamenhof bone sciis. Por trovi konsonantojn kun pinthoka supersigno, li ne devis transiri la sandlimojn de la rusa imperio. Liaj loĝ-

(Daŭrigo sur p. 14)



BULGARIO 1300-JARA

La unua konata loĝantaro de la bulgara teritorio estis tracoj. Post ili la Balkanan Duoninsulon loĝis slavaj gentoj. Fine de V-a kaj komence de VI-a jarcentoj de nia erao parto de la paganaj peĉenegoj, nomataj prabulgaroj, loĝantaj en la spacegoj okcidente de malsupra Volga kaj gvidataj de ĥano Asparuĥ, alvenis Danubon kaj instaligis en la teritorion de Dobruĝa, loĝatan de slavaj gentoj kaj regatan de Bizanco.

En la jaro 680 Asparuĥ disbatis la bizancanojn kaj konkeris la regionon inter riveroj Danubo kaj Timok okcidente, kaj Nigra Maro oriente, inter Danubo kaj Stara Planina (Balkanmontaro). En tiu teritorio fondiĝis la bulgara ŝtato. Kiel daton de la nova ŝtato oni konsideras la jaron 681, kiam la Bizanca imperio ĝin oficiale agnoskis. La nemultnombra prabulgara gento asimiliĝis de la maro de slavoj. Dank' al la organizaj kapabloj de la prabulgaroj la nova ŝtato estis solide kreita kaj akceptis la nomon Bulgario. Dum la regado de princo Boris I-a (852—889) la kristanismo estis trudita kiel oficiala religio. Ĝi kontribuis por la bonigo de l'internaciaj rilatoj de la nova ŝtato kaj por formado de la Bulgara nacio. En la sama periodo kreiĝis la bulgaraj alfabeto kaj literaturo.

Dum la regado de Boris la I-a kaj lia filo Simeon la bulgara ŝtato atingis altan kulturen nivelon. La disĉiploj de Kiril kaj Metodij — Kliment, Gorazd, Naum, Sava kaj Angelarij kreis, sur la bazo de la slavbulgara aboco, grandan literaturon, precipe religian. Tio efektiviĝis en du centroj de bulgara-slava literaturo — en urboj Preslav kaj Ohrid. Tiu tempospaco estas konata kiel ora periodo de la bulgara historio.

En 1396 Bulgario estis konkerita de osmanaj turkoj. Trudiĝis la osmana feŭda sistemo. Ekstis la preskaŭ kvin-jarcenta obskura jugo de la bulgara popolo sub la anatolaj turkoj. Ĝi retenis

la ekonomian kaj kulturen evoluadon de Bulgario. La regado de la osmanaj sklavigantoj en Bulgario estis terura.

La Aprilan Ribelon (1876), kies ĉefa preparanto estis la nacia heroo Vasil Levski, frakasis per fajro kaj glavo la osmanaj hordoj. La sekvan jaron la frata rusa popolo venis helpe al la sklavigita bulgara popolo, deklarinte la rusan-turkan liberigan militon (1877—1879) kaj venkobatis la armeon de la Osmana Imperio.

La periodo ekde la nacia liberiĝo (1878) ĝis la liberiĝo sociala (1944) pasis en militoj; bulgara-serba (1885), bulgara-turka (1912—1913) interalianca (1913), unua monda (1915—1918) kaj dua (1941—1944) militoj. La senĉesa militado ruinigis la landon, la kapitalisma sociordo alportis al la popolo malriĉecon, frakason de la ekonomio, regreson de la kulturo. La bulgara laboranta popolo organizis rezistadon, en kiu pereis multe da sentimaj bulgaraj filoj kaj filinoj. Miloj da kontraŭfaŝistoj estis ĵetitaj en la malliberejojn. Post faŝisma puĉo eksplodis la Septembra Ribelo (1923). La gvidanto de la bulgara popolo Georgi Dimitrov en 1933 dum la procezo en Leipzig, muntita de la germana faŝisma registaro, deklaris:

„... Popolo, kiu 500 jarojn vivis sub fremda jugo ne perdante sian lingvon kaj sian naciecon, nia laborista klaso kaj kamparanaro, kiuj batalis kaj batalas kontraŭ faŝismo kaj por komunismo — tia popolo ne estas sovaĝa kaj barbara.

... La bulgara popolo persiste kaj tutforte luktis kontraŭ la fremda jugo. Jen kial ni protestas pri la atakoj kontraŭ la bulgara popolo. Mi ne havas kaŭzon honti, ke mi estas bulgaro, kaj mi fieras esti filo de mia laborista klaso“.

Ĝis la liberiĝo de Bulgario en 1944, nia lando estis unu el la plej postrestintaj landoj en Eŭropo. Post la venko de la Septembra Ribelo 1944, la registaro de la Patrolanda Fronto faris radikalajn ekonomiajn kaj socialajn reformojn. Grandegan signifon por la evoluigo de la lando havas la ĉiufanka helpo de Sovet-Unio.

La industrio kreskis 39-oble kompare kun 1948 — la jaro de restarigo de la antaŭmilita stato de la lando. La instruado estas demokratia, senpaga. Evoluis kaj kreskis la nombro de instruoj ĉiugradaj, de sciencaj kaj kulturaj-klerigaj institutoj, rimedoj de amasinformato, muzika kaj literatura kreado, pentroarto, arkitekturo, teatro, kino. Grave kreskis la nombro de medicinaj institucioj. Kuracado en ili estas tute senpaga. Jus atingis nin agrabla novaĵo: jam en la instrujaro 1981/1982. Esperanto enkondukiĝas oficiale kiel fakultativa instruobjekto por lernejoj de la 9-a klaso en ĉiuj mezlernejoj, politeknikaj kaj metiaj lernejoj en la tuta lando!

En la jaro de sia 1300-jubileo Bulgara Popola Respubliko batalas plu por konservo de paco sur nia belega planedo. Nia popolo deziras pacon por povi plukrei socialismon, realigi pluan prosperon kaj feliĉan vivon de sia nobla kaj pacama popolo.

As. Grigorov

NIA NAJBARO, NI, KAJ LA DEMOKRATIO

(Pamfleto)

Niaj najbaroj estas bonaj, komplezemaj homoj. Ni eĉ havas la ŝancon, ke nia plej proksima najbaro estas riĉa posedanto de teksta fabriko. Se vi supozos, ke lia riĉeco kaj nia malriĉeco estas kaŭzo de malamikeco inter ni, vi erarus. Niaj rilatoj estas bonegaj. Ni konversacias pri multaj aferoj, sed precipe pri netrascendaj temoj, vetero, futbalo, ktp. Mi, tolerema homo, ofte diras: jes sinjoro, vi pravas. Antaŭ ĉio devas ekzisti najbara paco, laŭ nia enlanda demokratio.

Evidente, lia ekonomia situacio kaj tiu, ekzistanta en nia hejmo, estas kompareblaj kun la punkto kaj tago. En la hejmo de nia najbaro mankas nenio. Eĉ lukso ekzistas tie. Male, en nia hejmo ofte mankas la plej necesaj vivrimedoj. Sed ni ja vivas en demokratio. Ne gravas, ĉu unu mortas pro malsato kaj alia — pro troa manĝado. Nia socio celas la pacan kunvivadon inter diversaj sociaj tavoloj. Nia najbaro kaj ni bone plenumas tiun demokratian taskon.

Kiel dirite, la hejmo de nia najbaro estas eleganta, komforta. Ĉio troviĝas tie laŭ la lastaj atingoj de la teĥniko kaj de la scienco. En tiu domo vintro kaj somero ne ekzistas. En nia hejmo vintro kaj somero estas la reĝoj de la domo. Ĉiam abundas varmo aŭ malvarmo. Ĉio estas perfekta ĉe nia najbaro. Nia meblaro estas ordinara kaj tre malnova, la helpa hejma maŝinaro konsistas unike el la manoj de mia edzino. Sed nia najbaro kaj ni vivas en la plej bonaj rilatoj, laŭ la unua regulo de nia demokratio: paca kunvivado inter ĉiuj civitanoj.

Grava por mi estas la fakto, ke mi estas senlaborulo. Klarigo ne necesas. Nia najbaro rakontas al ni pri malfacilaĵoj en sia negoco kaj konstante plendas pri tiu situacio. Iam pri ni li diris: vi estas feliĉaj ĉar vi povas nenion perdi. Por vivi, vi ĉiam trovos, ĉu ŝtatan aŭ alian

(Daŭrigo de p. 12)

kaj laborlokoj Bjalistoko, Vejseje kaj Grodno, situis en litova lingvoteritorio. La alfabeto de la litova lingvo havas abundon da superkaj subsignoj, inkluzive de ŝ kaj ž. Zamenhof, do, havis ĉemane ortografian sistemon, kiu provizis lin per la pinthoka supersigno servanta por modifi konsonantajn sonojn. Li devis nur renversi la litovan pinthokon por ricevi la cirkumflekson.

Se estas akceptebla mia hipotezo pri la litovalfabeta fonto de la cirkumflekso en Esperanto, tio estas ankoraŭ unu atestaĵo pri la graveco de tiu balta lingvo en la formado de Esperanto. Esperantologoj jam trovis en Esperanto kelkajn leksikajn kaj strukturajn spurojn de la litova. Pli profundaj esploroj ĉi-terene estas entreprenendaj en la estonteco.

helpon. Li pravas kaj proprainiciate li realigas siajn diraĵojn. Iam li venis al ni dirante: bonvolu akcepti ĉi tiujn manĝaĵojn, ni aĉetis iom tro kaj ili putros en la fridujo. Kompreneble, ni ilin akceptis danke kaj eĉ riverence. Sama kanzono estas pri la vestaĵoj. Ankaŭ donacojn tiusence ni ricevas, se ili estas necesaj; mia edzino ilin re-tajlas al niaj korpomezuroj. Vivu la demokratio, nia kara kaj humana demokratio, kiu permesas la pluralecon de la sociaj ŝtupoj.

Evidente, la ekonomia krizo skuas la entreprenojn. Mi jam menciis, ke nia najbaro plendas kaj eĉ ploras rememorante pri bonaj epokoj. Tio ne obstaklas, ke lia familio somerumu ĉe la marbordo aŭ en la montaro, laŭplaĉe, ĉar ili posedas loĝejojn en ambaŭ lokoj. La montaro kaj la maro estas utilaj por la sano, precipe por la infanoj. Tion opinias nia najbaro kaj tiusence niaj konvinkoj kongruas, kvankam, verdire, ni tion neniam spertis. Vintre aŭ somere ni devas resti interne en la „musejo“, aŭ iom promeni surstrate, se la aŭtomobiloj de nia najbaro tion permesas, ĉar la dompordo de nia hejmo estas ofte barita de liaj aŭtomobiloj. Sed... niaj rilatoj estas bonegaj kaj ni sentas nin feliĉaj en ĉi tiu demokratio, kiu donas al ni tiom da libero.

Konstateblaj estas multaj aliaj avantaĝoj de nia sociordo, pli bone dirite inter nia najbaro kaj ni. Sed permesu al mi iom diri pri la filoj. Paradokse kaj sen la blindeco de patra amo, mi povas aserti, ke niaj filoj estas pli inteligentaj ol tiuj de nia najbaro. Sed praktike tio havas nek signifon nek influon en la disvolviĝo de iliaj vivoj. La filoj de nia najbaro vizitas lernejojn pli renomitaĵojn ol tiuj de niaj filoj. La mono de ilia patro iom post iom polurigos ilian klerecon. Male okazos al niaj filoj. La vizitado al ne adekvataj lernejoj kaj la manko de ekonomiaj rimedoj por superaj studoj iom post iom nuligos, almenaŭ parte, ilian inteligentecon. Tio estas nediskutebla, la filoj de nia najbaro okupos gravajn postenojn en la socio, dum niaj filoj restos en la ĝenerala plimulto. Evidente estas esceptoj, sed ĉi tiuj esceptoj faras nenian regulon. La vivo ripetiĝos. La filoj de nia najbaro daŭre estos la „sinjoroj“ kaj niaj filoj neniam okupos gravajn postenojn. Ili konstante devos diri: dankon, dankon, sinjoro! Sed... antaŭ ĉio, la demokratio devas esti respektata. Ni devas vivi en plej bona interkonsento, kion nia najbaro kaj ni bonege plenumas.

Mi, kiel bona civitano, defendas la demokration. La problemo estas scii: ĉu ĉi tiu demokratio estas justa. Por mi demokratio estas samrajteco, kun devigoj por ĉiu, kompreneble laŭ propraj kapabloj. Kiam en demokratio ekzistas tiuj privilegioj, fakte mi ne plu kredas je tiu sistemo. La opinio de malsatanto neniam estos opinio de satanto. Kiel povas ekzisti feliĉo kaj paco en socio, kie ekzistas la diskriminacioj?

Nun fininte mi demandas min: kial mi pensas, kial mi ne uzis la adjektivon „burĝa“ antaŭ la vorto „demokratio“! Sed tio estas mia opinio.

Luis Serrano Pérez (Hispanio)

PENTAGONO KLOPODAS PRI... EKONOMIOJ

J. Malikin

La financministro de Usono gvidis gravegan kunsidon. Subite la telefono alarmis lin. La voĉo de lia sekretariino:

— S-ro ministro, serĉas vin s-ro. . .

— Kiomfoje mi avertis vin: ne ĝenu min dum gravaj kunsidoj!

— Bone, mi tiel respondos al s-ro Mordbild.

— Kiu-u-u? Tuj ligu min kun li! — Gesinjoroj, mi anoncas dekminutan paŭzon. Eliru eksteren por iom refreŝigi kaj elfumi po cigarĉdon.

La geoficistoj unu post alia eliris rapide el la kabineto. La ministro tuj kaptis la aŭskultilon.

— Bonan tagon, s-ro Mordbild! Kiel vi fartas, kia estas via sanstato?

— Ĉe mi ĉio estas en ordo. Sed ŝajnas al mi, ke kun vi, Kap, okazas io malbona, eĉ tre stranga. Vi kvazaŭ intencas ŝpari monrimedojn rilate la defendon de nia patrolando? Ĉu vi forgesis, ke ekzistas milit-industria komplekso?

— Mi tion ne forgesas eĉ dormante, s-ro.

— Nu, bone, tiuokaze kion vi intencas entrepreni, diablo vin prenu. De kio vi ekonomios?

— Momente ni analizas projekton pri modernigo de malnovtipaj militŝipoj. Brila ideo, s-ro! Ni anstataŭigos ties kanonturojn per modernaj raket-instalaĵoj. . .

— Brila senencaĵo! Ĉu vi ne povas mendi al iu firmao de la militkomplekso produkti du-tri novajn aviadilŝipegojn? Simila mendo ne fiaskigos la financministerion, ĝi ne estiĝos almozulo.

— Guste tiel ni agos, s-ro! Ni ankaŭ pensas pri tio. Diru al Bill, ke li estu trankvila. Al lia firmao ni adresos sufiĉe bonan mendon pri atomaj submarŝipoj „Trident“ supozeble po miliardo kaj ducent milionoj da dolaroj por peco. Kaj kio rilatas la aviadilŝipegojn, ni nepre mendos tiajn. Al kiu firmao ni devas turni nin? Al kom-

PACPROPAGANDILOJ SERĈATAJ

Samarkanda Esperanto-Klubo de Interpopola Amikeco daŭre kolektas ĉiulandajn porpacajn afiŝojn, sloganojn, flugfoliojn, librojn, revuojn, ĵurnalojn, protestkanzonojn, fotojn, desegnaĵojn, insignojn, glumarkojn kaj aliajn pacpropagandilojn por siaj jam tradiciĝintaj migrantaj porpacaj ekspozicioj.

Laŭdezira rekompenco en formo de libroj, revuoj, bildkarto, albumoj, sondiskoj, diapozitivaj, memoraĵoj ktp., garantiata!

Bonvolu adresi ĉion al:

SAMARKANDA ESPERANTO-KLUBO DE INTER-POPOLA AMIKECO

SU-703000 SAMARKAND, Glavpoĉtamt, p. k. 76, Uzbekistano, USSR,

Validas ĉiam! Represo kaj nacilingvaj tradukoj petataj!

INFANDESEGNAĴOJ

Novosibirska centra Esperanto-klubo organizas en urba pentrajgalerio grandan internacian ekspozicion de infandegnaĵoj laŭ temoj:

- 1) Mia lando
- 2) Ni deziras pacon!
- 3) Mia ŝatata bildo kaj aliaj.

Sendu al ni desegnaĵon, faritan per ia ajn tekniko. Surdorse skribu nomon, aĝon, sekson kaj plenan adreson de la aŭtoro. Ĉiuj ricevos dankleteron sur bildkarto. Aŭtoroj de la plej bonaj desegnaĵoj ricevos per poŝto specialajn premiojn en rusa stilo (SO)

Aĝo — 3—15 j.

Limdato: 15. 04. 1982

Adreso: SU-630099, Novosibirsk, abonkesto 213, Esperanto-klubo



La Prezidento sin trejnas pri lanĉo. . .

panio „Teneko“? Bone, s-ro. Mi petas vin, informu la kompanion, ke ni pagos al ĝi po miliardo kaj duono da dolaroj por peco. Kompreneble, neniam ni volus ofendi la kompanion „Makdonell-Duglas“. Se mi bone memoras, neantaŭlonge ĝi ricevis de ni sep miliardojn da dolaroj por produkti militaviadilojn. Nun ni surprizos tiun firmaon: ni mendos mil kvarcent aviadilojn „F-15“, kiuj kostos entute. . . momenton! . . . dudek kvar miliardojn da dolaroj.

— Nu, tio jam estas alispeca konversacio, — komencis mildiĝi la voĉo de s-ro Mordbild. — Sed min ĝenas jen kio: kiamaniere vi sukcesos havigi novajn miliardojn por pluaj mendoj al la militindustria komplekso?

— S-ro, ĉio estas antaŭvidita! Ni reduktas la elspezojn pri realigo de pli ol cent socialaj programoj. En la kuranta jaro ni ŝparos tiamaniere dekkvar miliardojn, kaj en la venonta jaro — kvardek du miliardojn da dolaroj. Estos reduktitaj la sumoj por helpo pro senlaboreco, la elspezoj por medicina priservo de malriĉuloj kaj maljunuloj, la pensioj de veteranoj, la subvencioj por komunumaj bezonoj ktp. Gazeto „Vaŝington-post“ jam publikigis precizan kalkulon: rezulte de similaj reduktadoj la nombro de malriĉuloj en Usono plikreskos per miliono kaj naŭcent miloj da personoj.

— Nu, vi mobilizu tiujn sentaŭgulojn en la armeon!

— Kompreneble, s-ro! Mi estas tre kontenta pro via afabla atento al mi. Bonvolu ne ĝeni vin!

El la rusa: N. A.

*Pentagono — sidejo de la usona ĉefstabejo, nomata tiel pro la kvinangula (pentagona) arkitekturo de la konstruaĵo. „Pentagono“ fariĝis simbolo de la agresema politiko de usona imperiismo.

La redakcio varme gratulas la kunlaborantojn kaj la legantojn de „Paco“, same ĉiujn MEM-anojn okaze de la jarfino kaj la alproksimiĝanta nova jaro.

Ni bondeziras pluajn sukcesojn en la kruda batalo kontraŭ la preparo de terura nuklearmila milito, kontraŭ la obskureco kaj subpremo de polamasoj.

Ni utiligu la internacian lingvon Esperanto por senmaskigo de la intrigoj de la imperiistoj kaj la sklavigantoj, por aligo de novaj batalantoj por paco, libero, demokratio!

La nova jaro alproksimigu nin al la idealo de la homaro — paco kaj bonstato por ĉiuj popoloj sur la terglobo!

Jaro XXVIII, N-ro 6
Novembro-decembro 1981

REDAKTA KOMITATO

Violin Oljanov — ĉefredaktoro (Bulgario)
Nikola Aleksiev (Bulgario)
D-ro Detlev Blanke (GDR)
André Cherpillod (Francio)
William Gilbert (Francio)
Oldrich Knichal (ĈSSR)
Kimiaki Kurita (Japanio)
Nguyen Hai Trung (Vjetnamio)
Boleslav Stastczak (Pollando)

Lingva revizio: Asen Grigorov (Bulgario)
Arta redaktoro: Laurette Prijobilovska (Bulgario)
Korektis: Rajna Konstantinova (Bulgario)

La Redakcio atendas kontribuaĵojn de pacamikoj el la tuta mondo. Ju pli da kunlaborantoj, des pli varia kaj interesa revuo. Pro la nesufiĉa spaco la materialoj ne estu pli longaj ol 60 tajpitajn liniojn, nur en gravaj kazoj ĝis 90. Ili estu prefere tajpitaj aŭ tre klare mane skribitaj kun sufiĉa interlinia spaco kaj margeno, sur grandaj folioj de kancelaria formato. La Redakcio akceptas nur originalan (unuan) ekzempleron de la tajpaĵo. Kopioj estas lasataj sen konsidero. Skribu klare viajn nomojn kaj adresojn en nacia lingvo! La Redakcio ne resendadas neuzitajn materialojn.

KIEN SKRIBI.

Honora Prezidanto: Nikola Aleksiev, str. Nezabavka 1, vhod 2, 1113 SOFIA, Bulgario.

Prezidanto: D-ro Pethes Imre, H-1940, BUDAPEST VI, Nepköztarsasag utja 73, Hungario.

Vicprezidantoj: D-ro Magomet Isaev, prosp. Kalinina 14, MOSKVA K-9, USSR
Glady Claude, 36 Marne str., B-1030 Brussel, Belgio

Generala sekretario: William Gilbert, 30 rue Croix-Montoire, 37100 TOURS, Francio.

Sekretarioj: Syozi Nanba, Huruiti 3-13-26, Zyôto-ku, OSAKA, Japanio.

Ing. Angel Todorov, bulv. Emil Markov, bl. 37, II, 1404, SOFIA, Bulgario

Ĉefredaktoro: Violin Oljanov, kv. Emil Markov, P. K. 66, 1404, SOFIA, Bulgario.

Centra administrantino: Vasja Petrova, Bulgara MEM-Komitato, bulv. Hristo Botev 97, SOFIA, Bulgario.

Centra kasisto: (Por la okcidentaj landoj) Pierre Jouvin, 14 rue Thiers, 76120 GRAND QUEVILLY, Francio. (Poŝtkonto CCR — ROUEN, 102-45 P)

Respondeculo pri landaj numeroj de „PACO“: Helmut Fuchs, Hohe Str. 33, DR-83, PIRNA, GDR.

KIE ABONI

Aŭstralio: N. A. Collier, 7 Monomeeth St. BUDERIM, Qld. 4556.

Aŭstrio: Ernesto Quietensky, Pappenheimgasse 70/3/12 A-1200 WIEN AŭS. 100.

Belgio: Glady Claude, 36 Marne Str. 1030 BRUSSEL.

Brazilo: F-ino Elma Nascimento, str. D. Claudina n^o 100 apt^o, 402 MEIER RIO DE JANEIRO, RJ-CEP 20.721

Britio: Paul Hewitt, Laycroft. Main Road, COVENHAM, Louth, Lincs, LN11, OPF £4

Bulgario: Bulgara MEM-Komitato, bulv. Hristo Botev 97, 1303 SOFIA 3 levoj

Ĉeĥoslovakio: Ĉeĥa Esperanto-Asocio, MEM-Sekcio, Jilska 10, 11000 PRAHA 1 30 kronoj

Danlando: Egon Starup, Brovaenget 26, DK-2700 KOBENHAVN BRN. 35 d. kr.

Finnlando: Erkki Järvinen, Ukonkivenpolku 2-1-68 01610 VANTAA 61 30 fin. m.

Francio: Roger Degrelle, B. P. 23, F-54510 Tomblaine 771.77 R. Nancy ŭ poŝtekkonto) 40 fr. fr.

Germana Demokratia Respubliko: Centra Laborrondo Esperanto en la kulturligo de GDR, Charlottenstr, 60, 108 BERLIN 30 DM

F. R. Germanio: Roland H. Hegen, Iggelbach, Schlossgasse 30, D-6731 ELMSTEIN 20 DM

Hispanio: Luis Serrano Pérez, Font Nova 32, SABADELL (Barcelona) 750 pesetoj

Hungario: Hungara MEM-KOMITATO, H-1368 BUDAPEST 5, pf. 193 36 forintoj

Italio: Riccardo Pinori, V., le Ghisleri 9/15, I-00176 ROMA (p. ĝ. k. 64882004).

Japanio: Kurita Kimiaki, 411 Misima, Yata Sakuragaoka 1209-98 (Japana Pacdefenda Esperantista Asocio).

Kubo: Rufino López, Havana Esp.-Rondo, Poŝtkesto 314, HABANA 1

Norvegio: Olaf Reiersol, Buerstad N-3155 TOROD

Pollando: RUCH — WARSZAWA.

Portugaliao: Portugala E-Asocio, Rua Dr. Joao Couto 6 RC A-LISBOA 350 eskudo

Rumanio: Cosma Dorin, Muzicescu 26, sc. C., ap. 11, R-1900 TIMISOARA

Sovetunio: Unuiĝo de sovetaj societoj pri amikecaj kaj kulturaj rilatoj kun aliaj landoj, prosp. Kalinina 14, MOSKVA K-9 1,80 rubloj

Svedio: Tomas Jansson, Väktargatan 26 D, S 754 22, UPPSALA

Socialisma Respubliko Vjetnamio: Vjetnama Pacdefenda Esperantista Asocio, 197 Quan Thanh, HANOJ

Usono: Bern Wheel, 834, Wenonah Ave, Oak Park, IL 60 304 dol. 6,50

Aliaj landoj: Bv. turni vin al unu el la ĉi-supraj adresoj aŭ al Pierre Jouvin (centra kasisto — vd. maldekstre).

GRAVE!

Abonpagojn el socialismaj landoj sendu al 1303 SOFIA, bulv. Hristo Botev 97 (por „Paco“). El nesocialismaj landoj — al la adreso de la Centra kasisto — 40 fr. fr.